

Geografia nomenklatur, respondo al Tibor Sekelj
Claude Gacond, 312-a radioprelego, 1969.10.01 & 04

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni faris kopion de niaj radio-prelegoj pri la geografia nomenklatur, kiun ni donacis al sinjoro Tibor Sekelj okaze de lia restado en Svislando. La unua reago de Tibor Sekelj estis nin averti, ke li ne trovos la tempon legi tiun kvardekpaĝan dokumenton. Tamen, trafoliumante ĝin, li ekinteresiĝis pri niaj radio-prelegoj. Fine ni ricevis de Tibor Sekelj leteron kun rimarkoj, kiujn ni ŝatus raporti kaj diskuti.

A.- Sinjoro Tibor Sekelj skribas : « *La radio-paroladojn pri geografiaj nomoj mi finlegis. En la septembra numero de **Gazeto** mi intencas aperigi etan resumon, kiun mi mem faros – krom se vi faros ĝin kaj alsendos.* »

Cl.- Ni promesis ĝin fari, sed estos por pli malfrua numero.

A.- Sinjoro Tibor Sekelj plue skribas : « *Nun nur etan rimarkon mi havas. Vi diras, ke la landnoma sufikso de Volapük –**än** estas mallongigo de **län**. Mi neniam studis Volapükon nek ion scias pri ĝi. Tamen ŝajnas al mi multe pli simple pensi, ke Schleyer prenis tiun sufikson simple el la germana : Polen, Belgien, Bolivien, Norwegen, Schweden, Jugoslawien.* »

Cl.- Nia respondo. En la *Vortaro volapüka-franca kaj franca-volapüka* de August Kerckhoffs, kontrolita de Schleyer kaj eldonita en 1887, la naskiĝjaro de esperanto, mi legas : « **än** (de **län**, pays) est le suffixe des noms de pays. » Esperantigo : **än** (el **län**, lando) estas la sufikso por la landnomoj. Sekvas ekzemploj : **Lusän**, Ruslando, **Polän**, Pollando, **regän**, reĝlando, **fatän**, patrolando, **fimän**, firma lando, **Limepän**, imperia lando. Kiam oni konas la metodojn por la Schleyera vortformado oni tute ne plu cerbumas por trovi parencecon inter la naciaj lingvoj kaj Volapük. Jen kiel verŝajne Schleyer forĝis la radikon **Län** por lando. Li prenis la germanan **Land**, ĉar en Volapük la radikoj devas komenciĝi kaj finiĝi per konsonanto kaj havi ligan vokalon inter tiuj du konsonantoj kaj ĉar la renkontiĝo de **n** kun **d** ne estas permesata, la radiko iĝi **lan**. Sed tiu radiko jam ricevis la signifon **anim**, pro la transformo de la latina **animus** en **an** kaj la aldono de la konsonanto **l**, kiu permesas eviti, ke la radiko komenciĝu per vokalo. Do ĉar **lan**, pro simpla vortara ordo jam ricevis la signifon **anim**, **lan** kun la signifo **lando** devis ŝanĝiĝi. Aldono de **Umlaut** aŭ dupunktoj sur la vokalo permesis ŝanĝi **lan** en **län**. Jen la radiko. Ekzistas en Volapük regulo, kiu volas, ke la sufiksoj komenciĝu per vokalo kaj finiĝu per konsonanto, do la sufikso por la landnomoj ne povis esti **län**. Schleyer forprenis la komencan **l** kaj ricevis la sufikson **än**. Ĉar en la vortaro tiu sufikso ne ankoraŭ ricevis signifon, ĝi povis taŭgi. Ni ne devas serĉi pli komplikajn parencecon inter tiuj volapükaj radikoj kaj sufikso kun la naciaj lingvoj. Zamenhof inspiriĝis de Volapük, kiam li forĝis siajn sufiksojn : ankaŭ en esperanto ili komenciĝas per vokalo kaj finiĝas per konsonanto. La granda diferenco troviĝas en tio, ke en Volapük ili estas komplete arbitre forĝitaj, dum en esperanto ili ofte inspiriĝas de sufiksoj aŭ vortetoj, kiuj ekzistas en la naciaj lingvoj. Plia influo de Volapük super esperanto estas la bezono de sufikso por la landnomoj. Pri tio ni jam detalege parolis.

A.- Sinjoro Tibor Sekelj skribas : « *Tiu rimarko kompreneble neniel tuŝas la esencon de la demando. Estas pli gravaj rimarkoj. Ekzemple unue, ke vi tro emfazas la penson, ke francoj ne volas loĝi en **skatolo** – Francujo, kaj tio estas sofismo, ĉar ĉe tia penso vi prenas la malĝustan signifon de la sufikso –**uj**. Vi prenas la unuan signifon de la **Plena Vortaro**, anstataŭ la tria. Do vi simple misgvidas la penson de la aŭskultanto. Kun sama mislogiko vi povus diri, ke la francoj ne deziras esti fruktoj, kiuj kreskas sur arbo nomata Francujo.* »

Cl.- Nia respondo estas tre simpla. Dum pluraj elsendoj ni nur citadis Waringhien. La rimarkoj pri la sufikso –**uj** ne estas de ni, sed kiel ni konstante ripetis en niaj radioprelegoj, de

Geografia nomenklatur, respondo al Tibor Sekelj
Claude Gacond, 312-a radioprelego, 1969.10.01 & 04

Waringhien mem. Ni ĉerpis ilin el la interesege kaj fundamenta verko *Lingvo kaj Vivo*. Eĉ finna aŭdanto Harri Laine riproĉis al ni tiel longe nur citadi Waringhien. Nur poste li komprenis, ke ni ne faris nian propran teorion, ni prezentis, unu post la aliaj la diversajn vidpunktojn, kiuj sin alfrontas en la esperanta geografia nomenklatur. Waringhien neniam limigis la reagon kontraŭ la sufikso **-uj** al la francoj. Jen kion ni diris: « Waringhien konstatas, ke bedaŭrinde la sufikso **-uj**, kun sia konkreta kromsignifo de entenilo, estas ligita kun ideologio de gento kaj eĉ de raso. **Franĉujo** propre signifas **ujo por Francoj**, kio profunde ŝokas la komunan saĝon. » (Fino de la citaĵo.) Do ne nur la francojn, sed la komunan saĝon. Ĉiam citante el *Lingvo kaj Vivo* de Waringhien ni montris, ke « la sufikso **-uj** estas io unika en esperanto: neniuj aliaj sufiksoj havas tri signifojn tiel diversajn, neniuj aliaj prezentas tian kuriozaĵon, ke ĝia memstara uzo respondas nur al unu el la tri: rusa ujo estas ia vazo, poto, ktp... uzata ĉe rusoj, ĝi estas nek rusa arbo nek rusa lando. » (Fino de la citaĵo.) Mislogiko, sofismo ne estas miaj. Se oni legas la studon de Waringhien, oni trovas nenian mislogikon, nenian sofismon. Oni trovas interesan studon, kiu nun estas la fundamento de ĉiu esploro pri la esperanta geografia nomenklatur.

A.- Tibor Sekelj poste diras novan kritikon: « *Sur paĝo 793-a vi diras, « ke kiam diversaj ŝtatoj sendependiĝis, ili mem donis al si nomojn... ĉiufoje la ceteraj regnoj rajtis nur registri tiujn novajn nomojn, kaj la decidintoj petis permeson de nenia akademio en la mondo – eĉ ne de la esperantista. » - Tio certe estas erara. »*

Cl.- Mia respondo: Denove mi nur citadis Waringhien. Do ne estas mi, kiu eraras, sed Waringhien mem, kio fakte ne estas. Mi ree citas lin komplete: « *Kiam en 1921 la angla registaro, el la mandatlando Mezopotamio kreis la reĝlandon Irako; kiam en 1922 la Unio de Sovetaj Socialistaj Respublikoj difinis la aŭtonomajn respublikojn Ukraino, Belorusio, Georgio, Azerbajĝano, kaj tiel plu; kiam en 1938 la libera irlanda registaro dekretis, ke la regno reprenos la malnovan nomon Eĵro; kiam en 1944 tri eŭropaj regnoj decidis unuiĝi ekonomike sub la nomo Benelukso; kiam en 1947 la Imperio de Hindlando apartiĝis en tri dominiojn: Hindustano, Pakistano kaj Cejlono; kiam en 1957 la angla kolonio la Ora Bordo fariĝis sendependa ŝtato sub la nomo Ghana, - ĉiufoje la ceteraj regnoj rajtis nur registri tiujn novajn nomojn, kaj la decidintoj petis permeson de nenia akademio en la mondo, eĉ ne de la esperantista. »* Jen la teksto de Waringhien, kiun sinjoro Tibor Sekelj volas rebati per erariga ekzemplo, ĉar li prenas malnovan landnomon konstruitan per gentradiko. Aŭdu:

A.- « *La germanoj mem decidis nomi sian landon Deutschland, kaj tamen aliaj nomas ĝin Allemagne, Németország, Nemačka, Germany, Duitsland, Alemania, Doicu (japana) – kaj pri tio jes, okupiĝas kaj sankcias ĝuste la lingvaj akademioj franca, hungara, jugoslava, kaj tiel plu, kiel ankaŭ pri ĝia Esperanta nomo respondecas la koncerna lingva aŭtoritato. »*

Cl.- Nia respondo: Waringhien parolis pri la nomoj de la novaj landoj, Tibor Sekelj ne sekvis lian argumentadon kaj tamen provis kontraŭargumenti.

A.- La venontan semajnon ni daŭrigos tiun diskuton.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

-oOo-